

ALDONO AL „POLA ESPERANTISTO”.

4409353

Mia liro



D-ro LEONO ZAMENHOŬ
(Lozo).

VARSOVIO.
ELDONO DE JAN GÜNTHER.
1909.

Esper. 475 I



Biblioteka Uniwersytecka KUL



1001144566

ESTU BENITA ĈIU NOBLA FARO,
KIU PRO GRANDA BATALAS AFERO,
KIU DISPORTAS AL TUTA HOMARO
LUMON, SEMANTE FRATECON SUR TERO,
KAJ DUM VENTEGOJ DE BATALA FLAMO
LEVAS STANDARDON DE PACO KAJ AMO.

KORNEL UJEJSKI.

FUNEBRA MARŜO.

(Melodramo al la muziko de Fr. Chopin el sonato B moll,
op. 35).

Kie bruas sonorado? Ĉu en kapo mia?
Kien iras aroj pastraj kun kant' korva tia?
Antaŭ mi funebra iras paŝe veturilo...
Vidon mian mallumigis nigra mortkovrilo!

Le supre kruco lumas, torĉoj brilas sune,
Kaj mi iras subtenata,—iras oportune.
Senkonscie korpo mia sin antaŭen trenas
Bone! Oni min konduku, kien do mi venas?...

Iras mi en sonĝo kvazaŭ, mi nenion sentas,
Nur en koro kaj en kapo io min turmentas,
Io ungojn endronigas akrajn kaj dolorajn,
Kaj sonoroj bruas, ĝemas, kordojn ŝiras korajn.

Ha...muzikon mi nun aŭdas: ĉarma estas ĉarma...
Fajro en okuloj miaj, kaj la frunt' malvarma.
Ĉiuj strange min rigardas, sed el malproksimo:
Sur vizaĝ' ilia vagas kvazaŭ ia timo!

Ĉerkon tiras kvar ĉevaloj en funebra vesto
Kaj min trenas ia forto al terura festo...
Granda Dio, ĉerko tiu sin al mi alŝovas!
Ha! ĉi tie, en la ĉerko mia cel' sin trovas?...

Kial Vi min punis tiel, Vin kun nomo Dia?
 Kial, kial, ho!
 Vi, la reĝo de la sunoj kaj de vivo ĉia,
 Min disprenis do?
 Kie Vi,
 Forta Di'?

Ĉu Vin korvoj superbruas, aŭ la ĝema son'?
 Antaŭ mi Li ekaperu kun vid' ironia—
 Li—reĝo de l' sort'!
 Kvankam—nulo, mi potencas en doloro mia
 Pli ol Lia fort'
 Li—malbon',
 Li—malbon'!

Per ĉi vorto sonas ĉio,
 Jezu', Mario!
 Min incitas tiu son'
 La son'! la son'!

* * *

Sur veluro dormas bela,
 Plektas manojn ŝi,
 Kaj rideto ŝia hela
 Turnas sin al mi!

Vi ne sentas rozodoron
 De la kron'—ornam';
 Miaj kisoj vian koron
 Nun ne vekos jam.

Vi ne scias, ke mi paŝas
 Kvazaŭ senvivul',
 Ke la ĉerko Vin forkaŝas
 For de la okul'!

Ĉu por tio, amikino,
Floris mi sub sun'
Kaj mi amis Vin ĝis fino
Por tombigi nun?

Celo mia estas tio?
Jen edziĝa lit'?
Kaj ĝis nun mi vivas, Dio,
Mi—solul' ermit'?

Estis dolĉa kaj anĝela
Kaj min amis ŝi,
Kvazaŭ revoj flugis bela,
Dolĉa temp' por ni!

Tiam estis mi humila,
Kun anĝela sent';
El rigardo ŝia brila
Fluis sakrament'.

Al mi donis ŝi inspiron
De la virt', geni'
Kaj malfermis la eniron
Al ĉiel' por mi!

Kien fine min altrenis
La kruela sort'?
Al la tombo mi alvenis,
Tra esper'—al mort'!

Celo mia estas tio?
Jen edziĝa lit'?
Kaj ĝis nun mi vivas, Dio,
Mi solul', ermit'?

Ĉerkon prenis kaj forportis oni ĝin rapide,
 Min haltigi oni penas, ha... ha... vere ride...
 For de l' voj! Ĉar malfeliĉo estos malsaĝuloj:
 Estas forta mi kaj fajro flamas en okuloj!

Mi nur havas al ŝi rajton, ĉiuj tuj foriru!
 Nigra aro! Nur egala kontraŭ mi eliru!
 Ne por tia suferado estas via koro!
 Ili kuris for, mi iras reĝo de l' doloro!

Tra murmuro kaj tra miro, sonorila sono
 Mi aliras al la ĉerko—ĝis al mia trono,
 Ho fosisto, vi oferon novan nun akiros:
 Por enfosi tian reĝon, kiom vi deziros?

Enterigu min profunde, mordas min sufero,
 Pli ol via tero nigra premas min aero...
 Ne aspergu! ŝin eĉ sankta akvo makuligos:
 Mi ĉi-tie estas pastro: larmoj ŝin sanktigos!

El sub vesto de monaĥo mano elŝoviĝas —
 Tiel luma, tiel forta... mi genufleksiĝas,
 Min ektuŝis ĝi, mi falas kvazaŭ senvivulo...
 Oni prenis min, sed kien iros mi solulo?

Ha, por iom da feliĉo pagas koro nia
 Per da larmoj mar'?
 Mond' malsaĝa, mond' mizera, ĉu do estas tia
 Celo de l' homar'?
 Via ir' —
 Mia spir'!

En la mond' mi estas koro, vi nur vana son'!
Ĉu mi petis Vin pri tio, ke la fort' mistera
Alvenigu min?

Kvankam esto min katenas, restis mi libera
Tuj forlasi Vin.
Li—malbon'!
Li—malbon'!

Per ĉi vorto sonas ĉio
Jezu', Mario!
Min incitas tiu son'
La son'! la son'!



LA NIGRA ŜALO.

Kaj mi vin demandas kun bruo ebria
De kio rustiĝis ponard' akra mia?
Kaj kial la nigra ĉirkaŭas min ŝalo
Kaj sango sekiĝis sur ĝi per koralo?

Kaj vi min demandas, tre bone, ho Serboj,
Sed vino ekbruu antaŭe en cerboj.
Min kantoj lirstaj surdigu ĝis limo,
Por ke ne komprenu la vortojn l' animo.

Rapide sonigu la kordojn, lirstoj,
Kun plenaj pokaloj alpaŝu servistoj,
Sub kapon vi mian submetu kusenon,
Al vi mi malkovros de l' koro gehenon!

Kaj ŝaŭmas pokaloj kaj tremas la liro...
De l' brust' ŝia neĝa allogas min spiro...
Ĝis nun nigraj haroj odoras parfumon
Kaj brilas okuloj kaj jetas la lumon.

Ŝin tenis mi zorge en mia kastelo
Kaj ŝi por mi estis plej kara juvelo,
Pli kara ŝi estis ol eĉ la memoro
Pli muroj Semlinaj prenitaj kun gloro.

Pli kara ol mia ĉevalo-kaŝtano—
 En ĉiuj bataloj—fidela kompano.
 Kaj ŝi por mi estis... pleniĝu pokalo!
 Ĉu vino jam mankas por nia regalo?

Barelojn elrulu el kelo, servistoj...
 Bojanaj pranepoj, vi blankaj kantistoj,
 Pro kio ektimis la kanton malbeno?
 Ha... ŝi por mi estis... revita Edeno!

Kaj estis en ŝia vizaĝo grekina
 La ĉasto infana, majesto reĝina
 Ĉe ŝi min forlasis fiero kaj vano
 Kaj estis mi pia, humila infano.

Kaj vane blekadis ĉevalo en korto:
 De l' brust' ŝia neĝa nenia jam forto
 Deŝiri min povis: mi restis forĝita
 Al kol' de l' knabino de mi adorita.

Ĉar mi ŝin ĉirkaŭis per arko ĉiela
 Kaj ŝi por mi estis zorganto anĝela,
 Ĉar ŝin mi forrabis el baŝa haremo,
 Kaj ŝi por mi estis... lacert' sen dankemo.

Kaj tiel sur brusto ŝi rampis avide
 Ĝis koron ŝi mian ekvundis perfide!
 Kun fremda! Diablo! La sang' bolas mia...
 Ponardon! aŭ vino min faru ebria!

Min iam invitis amik' por regalo—
 Rapide al festo min portis ĉevalo.
 En mia kastel' ĉe Danubo staranta
 Servistojn mi lasis kun ŝi ploretanta.

Sopira kaj pala ŝi staris sur turo
 Kaj kvazaŭ malluman flageton sur muro
 Ventumis funebre la vent' ŝian ŝalon—
 Mi kovris vizaĝon kaj spronis ĉevalon.

Sed kiam mi estis en rondo intima
 Denove ekbrulis la fajro anima
 La tagoj forflugis ĉe kanto kaj vino,
 Mi tute forgesis pri mia knabino.

Ĝis nokto sonadis la krio batala...
 Subite alkuras serviŝt' mia pala
 Kaj iom al mi murmuretas rapide...
 Mi saltis—kaj pafis serviston perfide...

Mi tuje forlasis ĉe l' tablo najbarojn
 Kaj flugis mi fulme tra kampoj, arbaroj
 Kaj antaŭ ol tago lumigis ĉielon,
 Ĉeval' min alportis en mian kastelon.

Mi pordon debatis per pugn' kaj genuo,
 Kaj jen... en angulo... rigardu: la duo
 Pasie sin plektis en varma kunbrako—
 Mi ilin disigis per unu glavhako!

De frunto mi ŝia deŝiris la ŝalon...
 Kaj viŝis peŝ ĝi la sangantan metalon.
 Kaj antaŭ ol suno disigis nebulojn,
 Danubo forportis jam du senvivulojn.

Kaj Vi min demandas kun bruo ebria,
 De kio rustiĝis ponard' akra mia?
 Kaj kial la nigra ĉirkaŭas min ŝalo,
 Sur kiu sekiĝis la sang' per koralo?

Ŝi staras kaj bruston malkovras... Haido...
 Kaj min ŝi allogas... ruĝiĝas la vido,
 Kaj sango alfluas... Ho, nokt' malbenata!
 Atendu... mi iras... Di' estu kompata!

ĈIELENIRO.

(Preludo de Chopin 7.)

*Kuŝas mi sur nuboj,
 Ter', ĉiel' silentas
 Flugis for la duboj,
 Spiron mi ne sentas...
 De violodoro
 Min ĉirkaŭas ŝorĉo
 Kun revanta koro
 Flugas, naĝas mi...*

*Supre brilas steloj,
 Ĉirkaŭ mi sen bruo
 Rondflugas anĝeloj
 En ĉiela bluo.
 Daŭru ĝis la fino
 Tiu revo, dolĉo
 Koron en la sino
 Ho ne veku, Di'!...*

HAGAR EN LA DEZERTO.

Sub suna brulego mi staras sen movo
Ĉirkaŭe—dezerto; al Vi, ho Jehovo,
Mi preĝas kun voĉo de plor'
Fandiĝu sur nin la ĉiel, fajrigita,
Ekfrapu la fontoj el monto granita
Kaj sablo kovriĝu per flor'!

Ĉu iam Jehovo al mi autaŭ morto
Hebronon permesos rigardi la sorto
Kaj hejmon de l' mastro, ho Di'?

Ĉu iam, eĉ vivo se estos savita,
Sub tendo mi dormos de li dorlotita
Kaj bruton mi gardos por li?

Jam vestoj defalas, nudiĝas la koloj,
Rimenoj diskrevas sur niaj sandaloj
Kaj filo jam mortas de sek'!

Mi amis, ho Dio, kaj estis amata,
Feliĉa—kaj prave mi estas punata,
Sed filo ja estas sen pek'!

Kaj kiam la fajra ventego ekblovas
Kaj cindrajn nubegojn minace alŝovas,
Izmael kliniĝas al ter'.
Al vi tiam, Dio, rigardojn mi sendas

Kaj filon per korpo mi nuda defendas
 Por savi de l' fajra infer'!

Kaj ĉiam singardan dum nokta dormado
 Min ofte ekvekas sovaĝa kriado:
 Gazelon sufokas rabul'!
 Ĉirkaŭe—ŝakaloj, dezerto senfina...
 Sed bestoj forkuras, ĉar flamo tigrina
 El mia rebrilas okul'!

Kaj ofte sur blanka skeleto kamela
 Sovaĝe rigardas vizaĝo malhela:
 Ĝi estas migrulo sen spir'!
 Aŭ nin rimarkinte, tre ofte vulturo
 Dezerton trafendas per krio terura,
 Al freŝa vokante akir'!

Kaj kiam li dormas, mi portas... Ho Dio,
 Izmael ekstremis, li falas kun krio
 Kaj iri ne povas jam pli!
 Kaj buŝon malfermis. Ho granda Sinjoro,
 Aperu rapide do Via favoro!
 Vi granda, Vi forta, Vi Di'!

Jehovo, Jehovo, li ploras, li ĝemas
 Kaj buŝon brulantan al mia alpremas
 Kaj fajron elspiras per ĝi!
 Por voĉo, por mia ĉu mortis ĉielo?
 Jehovo, la roson! Moliĝu kruelo!
 Guteton de pluvo por ni!



ESTIS INTER NI NENIO.

*Estis inter ni nenio!
Nek konfido, kaj nek ĵuroj,
Fremda estis al ni ĉio
Krom printempaj revoj puraj;*

*Krom la freŝaj bonodoroj
Petolantaj kun la flaro,
Krom babilo inter floroj
Kaj herbaro en kamparo;*


*Krom torentoj kaj kaskadoj
Bruetantaj super kavoj,
Krom de birdoj la kantadoj,
De l' naturo dolĉaj ravoj;*

*Krom la fontoj, kie koroj
Trinkis raven ĝis ebrio
Krom primoloj, rozodoroj
Estis inter ni nenio!*

AL LA AMATINO.

Se mi hodiaŭ, aŭ morgaŭ aŭ iam
Subite devos ekdormi por ĉiam,
Mi volus, kara, sen ia doloro
Ligilojn ŝiri kun la tuta mondo
Kaj malaperi kvazaŭ meteoro
Aŭ kiel larmo en grandega ondo.
Sed antaŭ bati ĉesos mia koro
Kaj mi aperos antaŭ trono Dia,
Mi volus resti ĝis la lasta horo
Kaj morti, kara, nur sur mano Via.
Do, kiam morti al mi sort' ordonos
Kaj korpon mian Vi al ter' redonos,
Sciu: mi timas monaĥejan muron
Kun ĝiaj arkoj super frunto mia.
Mi volas havi ĉirkaŭ mi naturon
Ringon ĉielan luman kaj radian.
Sub tiu ringo kaj sur Brust' de l' tero
Vi kapon mian plenan de doloro
Kaj lacigitan de longa sufero
Metu kaj kovru per blanka marmoro,

Supre sin levu freŝa bonodoro
De arbetajoj ĉiam verdflorentaj,
De centfolioj, rozoj kaj dianoj,
De miozotoj gaje ridetantaj
Kaj de dalioj, de mirtoj italaj,
De miaj kampoj modestaj korvaloj.
Kion dum vivo al Vi mi alportis,
Post mia morto al mi Vi redonu,
Per ili kapon ornamu kaj kronu,
Ke de la floroj tiuj alpremata,
Ĉiam pli teren de ili puŝata
En la eterna disfluu mi spaco
Ĝis el velkinta en la tombo floro
Elkreskos nova—la floro de paco.
Al Vi odoran malfermos ĝi koron,
Ĉiuprintempe el tomb' aperante,
Ĝi el subteraj salutoj Vin randoj
Apud piedoj Viaj disflorante
Ĝi volvos ilin per floraj rubandoj.



H. G. DERVIZ.

NOKTOJ SENDORMAJ.

(Muziko de A. C.)

*Ho noktoj sendormaj, ho noktoj pasiaj,
Noktoj en lastaj sunbriloj dronantaj,
Vortoj senpensaj, rigardoj radiaj,
Floroj de P' morta aŭtuno velkantaj.
Ho noktoj sendormaj, ho noktoj pasiaj!*

*Eĉ se estonte la temp' senkompata
Montros al mi vian trompon kaŝitan
Tamen mi flugos al vi altirate
Ĉiam feliĉon serĉante perditan.
Ho noktoj sendormaj, ho noktoj pasiaj.*


M. ROMANOWSKI.

LA AMO.

*Tiu erpas, tiu plugas,
Tiu semas.
Ĉirkaŭ mi la vento flugas,
Brue ĝemas.*

*Ĉiu tedas min laboro
Sur la tero,
Vagus mi laŭ birda moro
En aero...*

*Sen Vi estas revoj miaj,
Nun senĉelaj.
Ah! okuloj nigraj, Viaj
Tiel belaj.*



LEONO ZAMENHOF

AL LA DUA KONGRESO *).

Sur ondoj de maro eterne ŝaŭmanta,
Sur brusto de akvoj spirantaj mistere
Obstine, kuraĝe antaŭen iranta
Ŝipeto malgranda glitadas libere.

Al celo ĝi iras senhalte kaj certe,
Ondegojn potencajn ĝi tranĉas facile,
Barilojn danĝerajn evitas tre lerte
Kaj tondrojn minacajn aŭskultas trankvile

Ripozas sur fundo jam ĝiaj kolegoj—
La frataj ŝipetoj; en fortaj mortbrakoj,
En akra batala kun maraj ventegoj
Pereis, trafitaj de l' sorto ekhako.

Sed ĉiuj atakoj de mondaj fortegoj
Resaltas senforte, murmure ĝemantaj,
Distritaj facile per kunaj penegoj
De l' bravaj ŝipanoj konsente remantaj.

Kaj naĝas ŝipeto kun kvazaŭ flugiloj,
Direktas ĝin lerte espero sen laco,
Frateco kaj amo—jen ĝiaj remiloj,
Kaj celo—eterna haveno de l' paco.

**) Deklamita dum la malfermo de la II Kongreso en Genevo 1906.*

Kaj kvankam en nuboj sin kaŝas haveno,
Ŝipanoj ne haltas en sia penado:
De l' bela estonto proksima alveno
Remantojn fortigas dum longa naĝado.

Hodiaŭ, Svisujo, al via haveno
Alnaĝas ŝipeto post jara irado;
Hodiaŭ en nia idea festeno
Aperas la dua de l' pac' Olimpjado.

Ho lando pacama, vi kie kuniĝas
En unu la francoj, italoj, germanoj,
Rigardu: espera standardo leviĝas
Por krei kunvivon por ĉiuj landanoj!

Malfermu do brakojn por nia anaro,
Al brusto alprenu nin, land' de l' libero,
Ni venis alporti al via altaro
La pruvojn de ĉiam flamanta fajrero.

Ekflamu per tiu fajrero la sentoj,
Forbrulu malamo en homaj animoj,
Kaj fine diversaj nacioj kaj gentoj
Ekĝuu sur tero la pacon sen limoj!

En nin inspiriĝu nun nova fervoro
Por vojon daŭrigi al celo amata,
Kaj nia komuna amika laboro
Konduku nin al la haveno benata!

En nuboj sin kaŝas ĉi tiu haveno,
Ni tamen ne haltu en nia penado,
Ĉar ni eĉ ne dubas pri fina alveno
Al cel' dezirata post longa naĝado.

LA LASTAJ HOROJ *)

La lastaj eksonis jam horoj,
Ni finis jam nian festenon!
Kun novaj impresoj en koroj
Ni nunan forlasas kunvenon.

Fandinte sur unu altaro
La sentojn kaj kunajn esperojn,
Ni freŝan fervoron al faro
Kaj freŝajn forportas fajrerojn.

Hieraŭ ankoraŭ fremduloj,
Hodiaŭ ni estas frataro:
Ĉar falis nun antaŭ okuloj
Nin longe barinta remparo.

Finiĝas kondamno miljara:
Homaro distrita sur mondo
Denove fariĝas fratara—
Eterne ligita homrondo.


Sed nun post praava eraro
Ni plu eĉ ne celos ĉielon—

*) Deklamita ĉe la ferma kunveno de la II Kongreso en Genevo 1906.

Ni restos sur ter', amikaro...
 Por novan eviti Babelon.

Hodiaŭ ni iros laŭ lando
 Kun nia senlaca laboro
 Por mondon de l' rando ĝis rando
 Flamigi per nia fervoro.

Kaj kiam forkuros la jaro
 Ni en miliona kuniĝo
 Alflugos al nova altaro
 Levita de ni en Kembriĝo.



T. ZIEMBIŃSKI.

SONU CIE NIA KANT'.

(Nova esperanta signo).

(Muziko de M. Hertz).

*Sonu ĉie nia kant'
 Ĝis la monda flugu rand',
 Malaperu ŝimo for',
 Veku amon en la kor'.*



MI AŬDAS VIN.

*Mi aŭdas Vin...
En trankvileco reviganta
Kvazaŭ balzam' al kor' fluanta
Via parol' sanigas min,
Mi aŭdas Vin...*

*Mi aŭdas Vin...
Per Viaj sonoj dorlotita
Mi flugas kiel ensorçita
For de la tero, ho Diin',
Mi aŭdas Vin...*

*Mi aŭdas Vin...
Ke Viaj sonoj tiel çarmaj
Sopirojn kvietigu larmajn
Kaj min pacigu ĝis la fin'!
Mi aŭdas Vin...*

*Mi aŭdas Vin...
Por Viaj vortoj kante dolçaj,
Por murmuretoj mire sorçaj
Mi al turment' oferus min
Por aŭdi Vin.*

NOVA JARO.

*Novan turnon ĵus finis la tempo,
Freŝan paĝon komencas homaro,
Fermis pardon la vivo pasinta,
Nin alvokas al ag' nova jaro.*

*Ĉu pesante la lastan rikolton,
Per malĝoj' ni plenigos la koron,
Ke ne dece ni portis standardon,
En batal' al ni mankis fervoro?*

*Aŭ fiere ni levos la frunton,
Rigardante la fruktojn kun ĝojo,
En la koroj sentante la flamon
Kaj la forton ne fali sur vojo?*

*Gaje sonas responde tintiloj,
Bruas venke standard' kun fiero,
Super ni ĉiam lumas la stelo
Klara, brila, la stel' de l' espero.*

*Ĝoje festas amika tendaro
Jaron venkan post pena laboro
Kaj al nova pretiĝas nun vojo
Por daŭrigi batalon kun gloro.*

*Nova jaro malfermu do pardon,
Al ni vojon ne baru al celo,
Ne timigos nin tondroj, ventegoj,
Ĉar espera kondukas nin stelo!*




H. HEINE

muz. de A. Rubinstein.

AZRAH.

*Ĉarma, juna kaj raviga
La filino de sultano
Ĉiutage dum vespero
Iris revu ĉe fontano,
Ĉiufoje ŝi renkontis
Ĉe la fonto murmuranta
Junan sklavon belan, palan
Kun rigardo sopiranta.
Al li fine la princino
Turnas sin kun la demando:
„Diru al mi nomon vian,
Vi el kiu estas lando?”
Kaj la sklav': „mi estas Mehmed
Mi—el lando de Islamo,
Mia gento—gent' Selima
Kiu mortas kun la amo.*



FR. MORAWSKI

LA RELO.

(Fablo)

Ĝemante sub batoj de martelo
Tiel plendis relo al ĉielo:
„Kiam finiĝos la batado,
Ĉu longe daŭros suferado,
Doloroj miaj kaj turmentoj?”
Nenion helpis la lamentoj:
Tiel longe suferis la relo
Ĝis oni faris ĝin martelo.

Vi demandos sendube, kion faris poste la relo?
Inter ĉiuj marteloj ĝi batis kun plej granda kruelo.

FR. MORAWSKI

AZENO.

(Fablo)

Ĉiam modesta kaj trankvila
Foje azeno humila
Fariĝis tiel fiera kaj vanta
Kaj eĉ aroganta,

Ke lin bestoj ne rekonis.

Li fanfaronis:

„Car la gepatra mia paro

Kaj la praava antaŭaro

Nobelan havis familion,

Do, mi meritas ankaŭ ion.

Kiaj kapoj kaj personoj

Sidis sur azenaj tronoj!”

Al li la vulpo: „via deveno

Sendube grandan meritas aplaŭdon,

Sed ĉu persone vi ne indas laŭdon,

Estante mem grandega azeno?

LEONO ZAMENHOF

VANAJ REVOJ.

*Flugi mi tre dezirus sub la firmamento,
Aŭ en arbaro densa revu dum vespero,
Aŭ kuŝante sur nuboj kuri kun la vento,
Flugpendi, kiel aglo alte en aero...*

*Mi kun la steloj dezirus paroli,
Kaj de amatoj kvazaŭ ia paro,
Revu, dorloti kun luno petoli,
Aŭ iri en la landon fremdan trans la maro...*

*Sed vane vojon serĉas la rigardo,
Senfrukte... mia vesto estas en... lombardo!*

AMORO KAJ MERKURO.

Unufoje sin renkontis
Di' Amoro kaj Merkuro.
Amor' havis en sagujo
Arkon pafan kaj sagetojn
Kaj Merkur' en sia sako
Havis brilajn moneretojn.
Di' de trompo kaj komerco
Tiel diras al Amoro:
„Donu al mi la sagetojn
Por la sak' kun mia oro”.
Di' de l' amo tuj konsentis,
Interŝanĝo tuj fariĝis,
Kaj sagujo de Amoro
Je la oro ekpleniĝis.
Vi ne miru, ke de tiam
Li nur vekas amfajrerojn
Trafrapante korojn lerte
Per brilantaj ormoneroj,
Merkur' ankaŭ malprudente
Siajn sagojn ne dissendas:
Pafas nur en certajn korojn,
Kie... monon li atendas.

EDWARD SŁOŃSKI

VI NE VEKU SONGOJN EN LA KOR'.

Vi ne veku songojn en la kor',
Sorĉ' ilia nin ne ravis plu,
Kion rabis de la temp' forflu'
Malaperis por eterne for'.

De jasmenoj freŝa bonodor'.
La kuŝiĝo de la sanga sun',
De arbaroj malproksima bru',
Ĉarm', silento kaj la pala lun'
Preterpasis, nur animdolor'
El mortintaj songoj blovas nun!



ENHAVO.

Kornel Ujejski.

Funebra Marŝo	5
La nigra ŝalo	10
Ĉieleniro	13
Hagar en la dezerto . . .	14

Adam Asnyk.

Estis inter ni nenio . . .	16
----------------------------	----

Zygmunt Krasiński.

Al la amatino	17
-------------------------	----

H. G. Derviz.

Noktoj sendormaj	19
--------------------------	----

M. Romanowski.

La amo	19
------------------	----

Leono Zamenhof.

Al la dua kongreso	20
La lastaj horoj	22
Mi aŭdas Vin	24
Nova jaro	25
Vanaj revoj	28
Amoro kaj Merkuro	29